




THE AMERICAN



ESPERANTIST

LA AMERIKA ESPERANTO

LA MONATA BULTENO DE LA ESPERANTA-ASOCIO DE NORDA AMERIKA

Joseph Leahy, General Secretary
Centra Officejo 1517 H Street, N.W. Washington, D.C. Central Office
J.R. Scherer, Pres. Los Angeles, Calif. -- E.G. Dodge, Ch. Exec. Comm. Wash. D.C.

VOL. 51. No. 12. ---10¢ per copy---\$1.00 per year--- October 1937
X*X

KOMERCA REKONO. La ĉi tie prezentata bileto vidigas la aspekton de la trikolora--nigra, verda, ruĝora--"street car pass" (tramveturila bileto) aĉetita po \$1.25 de cirkaŭ 80.000 enlogantoj de la urbo Washington, je la komenco de la semajno, junio la 27-a al julio 3-a, 1937. Ĉiu aĉetinte gajnis tiel la rajton veturi sen limo, kiel ofte li deziris, per ĉiuj tramveturiloj kaj la plimulte de la publikaj aŭtobusoj de la urbo dum tuta semajno. Kiel ofte posedante eniris tramon aŭ aŭtobuson, li devis mentri la bileton al la konduktere.

Por ke la konduktere povu tuj kaj senpene rekonii la tiaman validecon de la montrataj bilatoj, la desegno frape varias de semajno al semajno. La LKK de la jubilea kongreso de la EANA fieras kaj tre gojas ke la kompanio afable ak-

ceptis, per "Nia Semajno", la desegnon de la LKK proponitan. Ĝi farigis bona leka reklamilo per Esperanto. La Centra Officejo de EANA havas moderan provizen de nevenditaj bilatoj (afable donacit-

X*X

GISNUNA LISTO DE PATRONOJ

- | | |
|---------------------------|----------------------------|
| 1. F-ino A J Kruka | 10. S-ro S.M. Quraishi |
| 2. Prof. Frank Tomich | 11. F-ino Virgie Vail. |
| 3. D-ro Cecil Stockard | 12. (?) |
| 4. S-ro E.G. Dodge | 13. F-ino Julia May Leach. |
| 5. D-ro A.M. Schwager | 14. (amiko nomkasanta) |
| 6. Prof. A.I. Rogus | 15. (?) |
| 7. S-ro Henry W. Hetzel | 16. (?) |
| 8. S-ro Fred H. McMann | 17. S-ro Oscar Muenzer. |
| 9. S-ro William B. Patzer | |

Kiu ajn plua membro deziras farigi Patrono de EANA., bonvolu sin anoncu al la Sekretario. Ju pli multaj la subtenantoj, des pli bona kaj vastskala povos esti la laboro de EANA por "Nia Afero".

DANISH KING. At the Exposition in Skanderborg, the Danish King spent much time at the Esperanto stand, and it was noticed that he carried an Esperanto dictionary under his arm. (just like any other wise man-always prepared.)

MEMBERSHIP RATES.

- M---EANA & IEL, with "American Esperantist" for one year. \$1.50
- MJ--EANA, IEL, "American Esperantist" and Jarlibro (Yearbook). \$2.50
- MA--EANA, IEL, "American Esperantist", Jarlibro and "Esperanto Internacia." \$4.00
- MAH-EANA, IEL, "American Esperantist", Jarlibro and "Heroldo de Esperanto." \$6.50
- MS--EANA, IEL, "American Esperantist", Jarlibro--may receive both the Weekly and Monthly publications, or may elect to receive instead of the "Heroldo de Esperanto", a selection of book premiums from an already published list--ask for it. \$8.50

(Esperanto Internacia is the Weekly, and "Heroldo de Esperanto" Monthly.) The Yearbook is a directory of Esperanto Delegates in all parts of the World, Publications, Organizations, and all manner of information necessary to anyone wishing to be 'posted' on Esperanto affairs--worth many times more than cost of membership. EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF THE E.A.N.A.

Official Recognition. More and more Esperanto is finding favor in official circles. In the last two years the Brazilian Government has issued three series of Commemorative Postage stamps with Esperanto text. In November of last year, the beautiful green stamp, with star in center, surrounded by flags of many nations, was issued to commemorate the 1936 Annual Congress of the Brazilian Esperanto League. Recognising the 50 year Jubilee of the Esperanto Language as an EVENT of GREAT HISTORICAL VALUE, the Brazilian Post Office Department has issued a stamp commemorating the event--an enlarged picture of it shown here--green globe, with white band surrounding, on which is imprinted "Ora Jubileo de Esperanto". (VIVU BRAZIL, VIVU ESPERANTON! Esperanto not only surrounds, but covers the World.)

The Holland Post Office recently issued a set of 24 Picture Post-cards of the scenic and industrial features of the country. The entire back of the card is covered by picture. Language is Dutch and Esperanto. The Post Office is also considering the issuing of International Reply-Coupons, with Esperanto and Dutch text. Czeckoslovakia Post Office also issues a new series of Picture Post Cards, with Esperanto and Czeckoslovakian Language. Many of the Governments and Cities of Europe are spending immense sums in the production of Esperanto advertising, in their efforts to attract tourists. Every mail brings to C Office, beautiful specimens of folders and prospectuses. (For two(2) Reply-coupons you can have two of the Brazil Commemorative--one inside, the other outside of cover Address: Brazila Ligo Esperantista Marechal Floriano 212, Rio de Janeiro, Brazil.)



Nova brazila poŝtmarko kun Esperanto-teksto.

EDZIGOJ. En Vaŝingtono, D.C., la 3an julio, Kenneth F. Rogers al Bell Jackson. Ambaŭ estas bonan Esperantistojn. Koran gratulon, ni deziras felicton. Doneis-Harlow. En Bostono la 10an aŭgusto, Armin Francis Doneis, de Pharr, Texas, al Mary Ware Harlow, de Bostono. Koran gratulon kaj bondeziroj. Ho jes, ili estas ambaŭ Esperantistojn--Armin estas Ĉseh metodo instruiston.

HARALD THILANDER-BLINDA PIONIRO. Dum mia lasta prelega vojaĝo tra Eŭropo mi lernis, dum rapida unutaga studado, la Braille-skribon de la blinduloj por kapabli korespondi kun novaj geamikoj-blindaj gesamideanoj. Tre baldaŭ mi konstatis ke ekzistas granda popolo de blindaj Esperantistoj. Por ili la studo de ordinaraĵ lingvoj estas preskaŭ neblaĵo. En la lasta Generala Adresaro de la blinduloj (1937-eldono) troviĝas 1624 nomojn el 38 landoj. Usono havas 55. Sed kiuj estas la gvidantoj de la blindaj gesamideanoj? Kie ili loĝas? Ni tro malmulte scias pri ili! Nuntempe la plej fama blinda pioniro estas Harald Thilander, Svedo kiu en Aŭgusto ricevis de la Pola Prezidanto la distingon "Kavaliro de la Ordeno Polonia Restituta". Kia homo estas tiu samideano? Harald Thilander estos 60-jara je la 25. Oktobro. Dum la lastaj 37 jaroj li fervore laboregis por doni verdan lumon al la blinduloj de la mondo, kvankam li mem estas blinda, surda kaj havas tre malfortan sanon. Foje li estis brila sveda knabo, kiu en sia kvara jaro jam flue povis legi. Sed tre juna, li terure malsaniĝis je skarlatino kaj infanparaliziĝo. Li fariĝis blinda kaj preskaŭ tute surda. Dum jaroj li devis resti en lito, kaj oni volis amputi lian maldekstran manon. Sed li laŭte kriis prege al sia Dio dum kelkaj tagoj. Kiam venis la tago de la operacio, lia mano subite saniĝanta. Ĉu miraklo? Tion kredas s-ano Thilander. Nur kiam 18-jara li kapablis denove lerni ion ... kaj li venkis ĉiujn malhelpojn. Li volis kunigi la blindulojn de la mondo, kaj por tio li lernis flue la anglan, francan, germanan kaj eĉ latinan lingvojn. Sed iom post iom li konvikiĝis ke ili estas tro malfacilaj por ordinaraĵ, ofte malriĉaj blinduloj. Fine, 23-jara,

En 1900 li lernis Esperanton.

En 1908 li fariĝis redaktoro de la sveda semajna blinda gazeto. En 1912 li krome fariĝis redaktoro de la "Esperanto Ligilo" ... kaj tion li prizorgis dum la pasintaj 25 jaroj kun oferemo kaj energio. Li gajnis multajn amikojn per sia laboro, kiuj donacis monon kaj tempon. Eŭropaj blinduloj subite venis el la mallumo de siaj landoj kaj lingvoj --- kaj trovis geamikojn en aliaj mondpartoj. Eŭropaj reginoj subtenis la laboron. Sed mankas mono por kontentigi ĉiujn urgajn petojn de blindaj samideanoj por Esperantaj gazetoj.

Mankas loko tie ĉi por mencii ĉiujn farojn kaj meritojn de la granda pioniro Harald Thilander, kiu estas nomata la "Helen Keller de Esperantujo". Mi estas fiera esti unu el liaj multaj amikoj. En la nomo de la usonaj gesamideanoj mi deziras al la pioniro Thilander ankoraŭ multajn jarojn de laboro por Esperanto. Se iuj usonaj vidantaj gesamideanoj volas danki al Dio, ke ili havas bonajn okulojn, ili povas tion fari plej bone ... per lernado de la brajla skribo. Granda gojo por blinduloj kaj por la lernantoj mem estas la rekompenco. Ankaŭ malgranda sumeto de kvarona dolaro jare, (al mi per postmarkoj) helpas la blindulojn. Por tiu donaceto oni ricevas apartan, interesan, ilustritan gazeton duonjare "Ligilo por Vidantoj". Mi goje donos informojn!

Joseph R. Scherer.

 ESPERANTO RADIO FANS, ask short wave station in Poděbrady, Praha, Ĉeĥoslovakio. (Wavelength 25), to relay the Esperanto broadcasts from BRNO (audible in USA).

SEATTLE ESPERANTO SOCIETY, at annual election Sept 14: Pres. C W Whipple; Vice-Pres. Dr L A Badgley; Sec-Treas. Vincent Griffeth.

 D M LYND'S conducts Esperanto classes Monday and Tuesday evenings at 528 16th street, Oakland, Calif.

 * KURAGIGU LA ELDONADON en Brazilo, mendante rekte al Livraria Editora da *
 * F. E. Brasileira, -AV. Passos, 30, Rio de Janeiro, LA UNUAN LIBRON ORIGINALE *
 * VERKITAN EN ESPERANTO KAJ PRESITAN EN BRAZILIO: "Veterano?", de Ismael Go- *
 * mez Braga, prezo afrankita broŝ., l. 50 sv. fr., aŭ 0.40 usona dolaro; tole *
 * bind. 2.50 sv. fr. aŭ 0.60 usona dolaro. (aŭ egalvaloro). *

 MISS LIDIA ZAMENHOF arrived in New York Sept. 29. Itinerary not yet decided.

THE TEXAS ESPERANTIST. As S-ano William Plampin has moved to Syracuse, N.Y., the multiple duties of editor, reporter, publisher, etc., has been assumed by Rev. John H. Fazel (konata kaj amata) - in addition to his duties as President of the E.A.T. His usual energy is manifest in every line, urgently calling for news items, Teachers, Classes, "all towns where there is any sort of spunk and energy" to form Esperanto classes. He tells us of Boy Scout Troops whose members are studying Esperanto: In Topeka, Kansas, under Scoutmaster Joe Thompson. McPherson, Kansas under Scoutmaster, Dr Harry E. Thompson. Brookline, Mass., Scoutmaster Thomas Duncan and New York City under Scoutmaster George A. Connor. S-ano Fazel invited all Texas Esperantists to send to him \$2--50¢ of it to finance the Texas central office, and \$1.50 for membership in EANA. Several have already accepted the invitation. VIVU FAZEL - kaj Esperanto - and it certainly will if we can have a few more with the spirit of FERVORULO FAZEL. Vice pres. Philippa Stoneham devoted her summer vacation to a thorough study of Esperanto, and now goes back to her task as teacher in Bryan Schools. She will also continue in her efforts to make all Texas Esperanto conscious - and don't get the idea for a moment that sister Frances will not be in the front row working for Nia Afero also.

Bill Plampin was so popular that Texans are vieing with each other in their efforts to compose a suitable poem, something like "Oh Bill, how we miss you".

LIGHTNING STRIKES, fires and totally destroyed the 12 room home of one of our most active members - Miss Ann E. Beatty of Cardington, Ohio. Though in her 80th year, the catastrophe did not appall her. In her usual energetic way, she got busy with builders at once on a new house. I am sure she has the deep sympathy of all have met her - or know her through correspondence - or work.

ESPERANTO EN LA LERNEJON: NI ESTAS PRETAJ.

Antaŭ du jaroj EANA sin dediĉis al la celo enkonduki Esperanton en la lernejojn usonajn. La lasta jarkunveno ree aprobis la celon kaj entuziasmiĝis pri planoj. Neniu vorte aŭdigis dum la lastaj du jaroj kontraŭ la ideo. Do saĝne EANA daŭre subtenas la proponon. Nun ĉu usona publiko estas preta akcepti Esperanton? Mi ne timas tio: la historio montras ke la publiko ĝenerale akceptas kiel lernstudoj tion kion la lego diras. Kelkfoje la gepatroj protestas aŭ ek strikas kontraŭ studoj kiujn ili opinias malbonajn por la infanoj. Sed kiam la studo nova estas nur unu aldonata al listo de aliaj similaĵoj, neniu protestas, kaj ĉiu akceptas pace. Oni ofte kontraŭas la devigan lernadon de nebezonaĵoj studoj kiel latina aŭ greka lingvoj; sed oni neniam aŭdas protestojn kontraŭ elektebla studo. Nu Esperanto estos elektebla laŭ nia legpropono; kiu do povos batali ĝin? Instruistoj troviĝos, unue inter instruistoj kiuj iam interesiĝis pri Esperanto, due tiuj kiuj volos kaj povos lerni ĝin por poste instrui. La administrantoj fidos la zorgon al tiuj kiuj elektos. La historio montras ankau ke la publiko plej rapide kaj facile edukigas pri iu nova ideo kiam lego estas deponita, ĉar la diskuto pri ĝi en la publika presaro vekas egan intereson kaj informas pri ĝi. Ni devas ne timi! Ni varbu kaj ni klopodu! Sed ni faru nian Esperantoleĝon!

Sept. 17 1937 Joseph W. Dubin

FOIRO de REICHENBERG. Varbis ĉi-jare per belaj Esperanta-afisoj kaj glumarkoj. Ĝi havas apartan Esp-Fakon jam de multaj jaroj, kiun gvidas s-ano Prof. ing. Gustav Scholze, prez. de Germana Ligo de Esperanto en Ĉeĥoslovakio.

ROTARY INTERNATIONAL, at their recent International Rotary Congress, in Nice, France (In June), elected an active exponent of Esperanto, to its presidency - S-ano Maurice Duperrey of Paris. He has written a letter - in Esperanto of course - to our very active S-ano Virgil Dibble of S.C. in reply to an invitation to visit Columbia on his arrival in America next month. S-ano Dibble is secretary of the Columbia Merchants Association. Bonvenon S-ano Duperrey.

LAST CHANCE TO REGISTER. TUTMONDA ADRES-LIBRO de ESPERANTISTOJ.

The Esperanto Museum in Vienna, Austria, is carrying out the ambitious project of a book containing addresses, titles and occupations of all Esperantists-in so far as they will go to the small trouble of sending in the information, with the very moderate registration fee of 25¢. (This work was started by Dr Zamenhof, a short time before his death). If you wish to advertise for correspondence, make remittance for 50¢. Clubs-10 or more-listed free; and a free book to any club which sends in ten names.

We have published this information before, and a goodly number of American Esperantists have already registered, but nothing like the number who ought to adorn the book by the addition of their names-to our country's credit. This is the last call. Registrations, to be accepted must reach Vienna within the present month. Send the data and the 25¢ without delay, to Joseph R. Scherer, 4474 W. Adams, Los Angeles, Calif. (Use AIR MAIL, to be sure.) Sample registrations:

Smythe, Ferdinand K., M.D., kuracisto, 1797 N. Flynn Ave., Dover, Utah, USA.


Ordely, F-ino Mary Alice, dommastrino, R F D 5, Branchton, Texas, U S A.

Of course this book will not succeed in registering ALL Esperantists-nobody expects so much. But it will be a milestone book of historic value; and if you should say "Oh, what do I care for this?" you may later be regretful that you neglected to be enrolled beside those who did care.

X*X
* D U S U R P R I Z O J N *
* antenas nia prospekto pri la konata internacia *
* perfektiga skriba Esperanto-kurso. *
* Ankaŭ por vi amerikaj Esperantistoj! *
* Do senprokraste petu nian senpagan prospekton. *
* Esperant@-Instituto "Isosek" *
* Geleenstraat 66 Heerlen, Nederlando. *
X*X

"RONDO DE LIBROLEGANTOJ." Registrations in this new and mutually helpful circle started to come in almost as soon as the mails could carry out our September number, and bring back replies. The idea is good and useful, and we expect to hear from "you all" in due time. But the present issue has to have its press copy all prepared so long before the first of the month that we must postpone list of 'Star' Esperantists. Of the first three replies, one was a "5-point Star member", from central state, one a "3-star member" from the South, and one a new Esperantist who has just completed his first book of 111 pages (he is from the 'far north'). These newer Esperantists, enrolling in the first degree and with their first Star, are just much a source of pride as are the 'old timers'. It is with the new Esperantists that the movement must grow.

ESPERANTO PENNANTS



Like the one pictured here- useful for the auto, clubroom, den. Green star and word on a white field. 18 x 36 inches - washable cotton felt. Send 55 cents to J.W. Dubin- 646 Westview St.-Phila.

STAMP CANCELLATIONS. Many of the European Post Office cancellation stamps have the text in Esperanto-from the "Austria Esperantisto" we read: "La Direkcio de la nederlanda poŝto farigis specialan poststampilon, per kiu estas stampataj ĉiuj poŝtaĵoj, kiujn oni ekspedas per la propra poŝtkesto de la Esperanto-Domo. La stampilo montras la daton de la ekspedo kun la vortoj "Esperanto-Domo, Arnhem" kaj kun la kvinpinta stelo."

T A Ŭ G A J R I M E D O J P O R V A R B I J U N U L O J N .

(Premiĝajnta Artikolo de Thomas Goldman,
studento----18-jarulo----en Harvard'a Universitato.)

Estante junulo, mi tre interesigas pri la problemo de varbado de junuloj. Junuloj estas la plej dezirindaj Esperantistoj, kaj ni varbos facile ilin, mi kredas, se ni fervore klopodos. Junuloj pli facile ol plenaguloj lernas. Ili havas pli da tempo por dani al Esperanto, kaj pli facile entuziasmiĝas pri ĝi. Krome, ili havas antaŭ si la tutan vivon por helpi la Esperantan movadon. Ili eĉ povas esperi ke ili vidos Esperanton triumfanta. Ankaŭ, se ni deziras enigi Esperanton en la lernejojn, ni devos konvinki, ne plenagulojn ĉefe, sed junulojn ke tio estus dezirinda. Nur konvinkinte junulojn ni povos konvinki plenagulojn, ĉar ni montros al ili ke la junuloj deziras lerni Esperanton. Tial, ni devas vigle agi por aligi junulojn al la Esperanta movado en Usono. Kiel ni faru tion? Unue, ni devas decidi ke ni faros ĉion eblan por varbi junulojn; nur posedante tiun decidecon ni povos agi efike. Tiel decide, ni trevos, laŭ mia opinio, ke la unua necesajo estos duonaparta administrado per junulaj membrecoj de EANA. Tiel, ni povos scii kiel fartas niaj klopodoj por varbado de junuloj; ni povos pli facile kaj pli efike trakti la apartajn problemojn de junularo Esperantista. Ni povos ankaŭ doni per tio, unuecon kaj koheremecon al ĉiuj junaj Esperantistoj en EANA. Hodiaŭ ili sin sentas malgranda kaj malgrava parto de la Esperanto movado en Usono. Tamen, iliaj vicoj kreskos rapide, kaj ili mem baldaŭ petos (kaj eĉ necesigos) tian apartan administradon, kian konsilas. Stariginte duonapartan administradon, ni devos plifaciligi al junuloj informigon pri Esperanto, --eĉ pri ĝia ekzisto. Mi kredas, mi ja fidus, ke kiam junuloj informigos pri Esperanto ili aligos centope, sed nuntempe ili ne scias. Varbado okazas ĉirkaŭ unuviraj nukleoj; ni devas etendi la ĉirkaŭon de tiuj nukleoj. Ni devas ekkapti ĉian okazon por sciigi junulojn pri Esperanto. Ni devas ankaŭ reklami, kiel eble plej multe; malgranda anonceto en gazeto interesigos centojn. Ni devas enigi Esperanton en ĉiun fakon de vivo de junulo. Skoltoj? Evidente. Sed ne nur skoltoj, sed al la lernejo, al ludado, al flankokupoj, --por studentoj, aĵ politiko, (mi citas la grandan studentaran intereson pri paco,) --eĉ al mango kaj amo ni devas rilatigi Esperanton. Tiel, kaj nur tiel, ni grandnombre aligos al la Esperanto movado junulojn. Sed por atingi sukcesan indan, ne sufiĉos interesigi kaj aligi junulojn; ni devos konservi ilin, kaj subteni ilian intereson. Por fari tion, mi opinias, ni devos gvidi la junulojn, kaj ni devos emfazigi lernadon kaj korespondadon. Por plenagulo aliginta al Esperanta grupo, granda parto de la valoro de lia membreco estas okazo por kunveni kune kun samideanoj por sin amuzi. Junulo, tamen, apartigas sian socian amuzadon de aliaj flankokupoj, kaj kiam li venas al Esperanta grupo, li serĉas; ne kantojn kaj ludojn, sed Esperanton. Tial, ni emfazigu la lingvon. Kiam, ankaŭ, plenagulo estas lerninta Esperanton, oni permesas al li fari laŭvole. Se li deziras plue studi Esperanton, aŭ se li ne deziras; se li deziras aligi al EANA, aŭ ne; se li deziras korespondi, aŭ ne, --li faras tion, kion li deziras. Sed se oni permesas junulojn fari laŭvole, ili ne organizigos, faros nenion, kaj forlasos la Esperantan movadon pro inerteco. Tial, ni gvidu ilin. Nature, oni ne devas, kaj ne povas, devigi junulojn fari ion kion ne plaĉas al ili. Tamen, oni devas sugesti ion dezirindan por plenumi; oni devas doni al ili celon. Tion oni povos efektiviĝi, mi opinias, se oni starigos rangojn, stingebajn per studado de la lingvo kaj plibonigado je ĝia uzo. Atingo de pli alta rango estas efika celo por junuloj, kaj ili samtempe igos pli bonaj Esperantistoj. Eble la nuntempaj ekzamenoj sufiĉos, sed necesos sur ilin meti emfazon. Mi diris jam ke la vicoj de junuloj Esperantistaj kreskos, sed ni ne devas permesi la procedon okazi laŭ si mem; ni devas nin pretigi hodiaŭ por la problemoj kiuj ekaperos. Tial mi konsideras la ĉi-suprajn sugestojn taŭgaj. Ni agu, dum tempo restas!

SINCE 1902. The "Bruga Grupo Esperantista" the oldest group in Belgium, will celebrate their 35th year Jubilee, Sunday October 3rd-their birthday.

Esperanto — vivanta lingvo.

Esperanto tra la mondo

UNU KOLONO DE NOVAĴOJ POR LA GAZETARO.

(La legantoj bonvolu traduki en sian nacian lingvon la ĉi-subajn artikoletojn kaj proponi ilin po du aŭ tri — sed prefere ne ĉiujn samtempe — al siaj lokaj ĉiutagaj gazetoj. Per tiu ĉi servo vi faros al la Esperanto-movado gravan utilon, ĉar vi tiamaniere konstante informos la publikon pri la ekzisto de Esperanto kaj pri ĝiaj venkoj.)

Lingvo festas sian 50-jaran naskiĝtagon.

En tiuj ĉi tagoj estas pasintaj 50 jaroj, de kiam aperis en la mondo nova lingvo: la internacia lingvo Esperanto. Kvankam 50 jaroj en la historio de lingvo signifas ne grandan tempospacon, tamen la lingvoprojekto de la pola okulkuracisto D-ro Zamenhof trovis en tiu mallonga tempo mondskalan disvastiĝon kaj fariĝis jam vere vivanta lingvo. Pluraj milionoj jam lernis tiun lingvon, dekmiloj konstante uzas ĝin apud sia nacia lingvo, legante, korespondante aŭ vojaĝante, kaj pluraj miloj ĉiujara renkontiĝas ĉe diversaj internaciaj kongresoj, konferencoj kaj libertempoj. Ekzistas en tiu lingvo jam multaj libroj kaj aperas multaj gazetoj, inter ili unu semajna gazeto en tagjurnala formato, kiu eliras regule ekde la jaro 1920. Esperanto estas instruata en sennombraj kursoj, ĝi estas flegata en miloj do kluboj, multaj gravaj korporacioj kaj internaciaj organizoj ĝin aprobas, kaj ĝiaj ŝancoj por fariĝi la dua lingvo por ĉiu (la unua fremdlingvo) apud la gepatra lingvo kreskas konstante. Kiam ĝi estos ĝenerale enkondukita, ĝi sendube fariĝos por la homaro eĉ pli granda beno ol la enkonduko de la presarto.

Jubilean poŝtmarkon por memori la Oran Jubileon de Esperanto

eldonis la Poŝta Administracio de Brazilo. La poŝtmarko montras la terglobon, ĉirkaŭligitan de rubando kun surskribo: ORA JUBILEO DE ESPERANTO. La poŝtmarko havas valorindikon de 300 rejsoj. Ĉi tiu estas jam la kvara poŝtmarko kun Esperanto-teksto, eldonita de la brazila Poŝto.

La Jubilea Kongreso de Esperanto

finiĝis antaŭ kelkaj semajnoj en Varsovio, la urbo kie laboris kaj kie estas enterigita la kreinto de tiu ĉi lingvo, D-ro L. L. Zamenhof, kaj el kie ĝi antaŭ 50 jaroj komencis sian triumfiron tra la mondo. Partoprenis ĉ. 1100 kongresanoj el 30 landoj. Okazis vizitoj al la tomboj de D-ro Zamenhof kaj de lia unua adepto Grabowski. La Kongreso akceptis rezolucion pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn. La venonta (30-a) Mondkongreso de l'esperantistoj okazos venontjare en Londono. Por 1940 estas projektite aranĝi la Mondkongreson en Tokio.

El Saŭlo fariĝis Paŭlo.

Samtempe kun la 29-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta antaŭ kelkaj semajnoj en Varsovio, tie havis lokon ankaŭ la 14-a Internacia Kongreso de blindaj esperantistoj, kiun partoprenis blinduloj el 14 landoj. Okazis dum unu kongreskunveno, ke pensiita kolonelo, s-ro Klobukowski, kiu devis saluti en la nomo de iu blindula organizo Varsovia, parolis kontraŭ Esperanto kaj ĝia uzado inter blinduloj. Dum la kongreso la kolonelo interesiĝis pri ĉiuj laboroj, kaj li konvinkiĝis ke ili estas fareblaj nur dank' al Esperanto, kiu kapablas solvi la lingvan problemon en internaciaj rilatoj.

De jaro al jaro plimultiĝas la internaciaj kunvenoj de esperantistoj, kaj de jaro al jaro Esperanto pli fariĝas vivanta lingvo. Pentekoston okazis en Parizo la grava Konferenco « Esperanto en la Moderna Vivo », vizitita de 600 delegitoj el 22 landoj. Antaŭ kelkaj semajnoj finiĝis en Varsovio la 29-a Universala Kongreso de Esperanto, kun 1100 partoprenintoj el 30 landoj. En Nederlando okazis samtempe du internaciaj fakkongresoj esperantistaj: katolika en Hago kun proksimume 400, kaj laborista en Roterdamo kun pli ol 800 partoprenantoj. Krom tio estis aranĝitaj internaciaj esperantistaj libertempoj en dekduo da lokoj diverslandaj, el kiuj kelkaj havis neatendite grandan sukceson: en Helsingör (Danlando) libertempis 210 esperantistoj el 14 landoj (intra ili 160 eksterlandanoj), en alia dana loko Fuglsø 180 el 11 landoj.

Esperanto en tria vico ĉe konkurso de Radio Roma.

Laŭ la aŭtentikaj ciferoj pri la tria turisma konkurso de Radio Roma, estis ricevitaĵ por la konkurso 209 verkaĵoj en la lingvo franca, 163 en la germana, 101 en Esperanto, 68 en la angla kaj 61 en la nederlanda. Du esperantistoj ricevis kiel premion senpagajn restadon en Italujo, nome unu konata artpentristo en Gent (Belgujo) kaj unu redaktoro en Luksemburgo.

Nederlanda Poŝto eldonis bildpoŝtkartojn kun Esperanto-teksto.

Sekvante la ekzemplon de la aŭstra, brazila kaj aliaj poŝt-administracioj, nun ankaŭ la nederlanda poŝto eldonis serion de 24 novaj ilustritaj poŝtkartoj kun surpresita poŝtmarko. La klariga teksto de la poŝtkartoj estas en la lingvoj nederlanda kaj Esperanto.

Ĉeĥoslovaka Poŝto propagandas por Ĉeĥoslovakio per poŝtkartoj kun Esperanto-teksto.

Ĉeĥoslovaka Poŝto eldonis bildkartan serion sub la devizo: « Ekkonu vian patrujon! Propagandu ĝiajn belajn helpoj de la poŝto! ». En tiu ĉi serio troviĝas du kartoj, kies surskribo estas presita, krom en la lingvo ĉeĥa, ankaŭ en Esperanto. Estas kartoj pri bankloko Lazne Belohrad kaj pri la urbo Brno — du lokoj havantaj specialan rilaton al la Esperanto-movado.

Hungaraj brodaĵoj. Verkis Ladislao de Spolarich, direktoro de ŝtata virinindustria instituto. 2-a kajero de serio « Pri Hungarlando por Tutmonda Esperantistaro » (la unuan kajeron ni ne ricevis). — 24 p. 15x23 cm. Eldonis Hungara Esperanto-Federacio, s-ro J. de Mihalik, Bejczlut. 1, Sashalom, Hungarujo.

Enhavas plejparte ilustraĵojn (25), kiuj prezentas la belegajn hungarajn brodaĵojn en variaj modeloj. La broŝuro ĉefe interesos virinojn. Prezo ne estas indikita; verŝajne oni liveras la broŝuron senpage, propagande por la hungaraj domindustriaĵ manlaboraĵoj.

Foiro de Reichenberg, 15-22. Aŭgusto 1937, Ĉeĥoslovakio, eldonis grandan esperantlingvan afiŝon (61x94 cm.) kaj la saman afiŝon en malpli granda formato (25x37 cm.). Ĝi montras la konataĵ RM-magneton, nunfoje en formo de aeroplano. — La Foiro eldonis ankaŭ novan esperantlingvan glumarkon (3,5x4,8 cm.).

Krynica. Bele ilustrita (per 35 bildoj) esperantlingva broŝuro pri la plej fama kuraĵloko en Polujo. — 24 p. kaj kovrilo, 10x20 cm. — Petu la broŝuron kaj ankaŭ pli detalajn informojn de: Ŝtata Estraro de Kuracejo, Fontkuraca Komisiono kaj Loka Vojaĝoficejo « Orbis », Krynica, Polujo.

Esperanton en Lernejojn I

Rezolucio de TAGE pri la enkonduko de Esperanto en lernejojn, proponita al la Ferma Kunsido de la Jubilea Kongreso, kaj unuvoĉe akceptita de la Kongreso.

Konsiderante unue, ke la solvo de la problemo de unu helpa facila lingvo internacia en la epoko de la aviado, de la radio kaj de la filmo sona por ĉiuj internaciaj rilatoj estas ĉiam pli kaj pli urĝa, kiel interalie pravas la lasttempa propono de senatano Macartney Abbott, aprobita de la aŭstralia federala senato, pri la kunvoko de speciala Interŝtata Konferenco; konsiderante due, ke la sola praktika solvo de tiu ĉi problemo, kiu jam grandparte fakte aŭtomate efektiviĝas, estas ne nur laŭ la kompetentaj lingvistoj, sed ankaŭ laŭ la raporto de la sekretario de la Ligo de Nacioj de 1922, la artefarita lingvo Esperanto, kreita en 1887 de pola kuracisto D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, — lingvo, kiu de la simpla projekto dum apenaŭ duonjarcento fariĝis granda socia movado, laŭ kultura vidpunkto kaj vere neŭtrala helpa lingvo vivanta, uzata en ĉiuj landoj de miloj kaj miloj de laŭvolaj adeptoj por diversaj sciencaj, profesiaj, ideaj, politikaj, religiaj kaj aliaj celoj, tiel politike neŭtrala, teknike perfekte faciliga rimedo de la interkompreniĝo inter la popoloj de ĉiuj kontinentoj.

Konsiderante trie, ke la literaturo kaj la gazetaro en tiu ĉi lingvo ĉiam pli riĉiĝas kaj servas al ĉiuj celoj, ke samtempe la teknika vortaro de ĉiuj lingvoj; ĉiuflanke ellaborita estas jam pli riĉa ol en multaj eŭropaj lingvoj;

konsiderante kvar, ke Esperanto uonas lingvan egalrajtecon al ĉiuj nacioj en la internaciaj traktadoj;

konsiderante kvin, ke en multaj internaciaj organizaĵoj (institutoj, kongresoj, oficejoj, foiroj), eĉ en oficialaj, kiel Internacia Oficejo de Laboro, Esperanto fariĝis jam fakte en uzado laŭvice kvara aŭ kvina internacia lingvo apud la franca, la angla, la hispana kaj la germana, ĉiam kiel lingvo preferata de la larĝaj amasoj kaj plej korekte uzata el ĉiuj lingvoj;

konsiderante ses, ke en multaj landoj ekzistas jam pli aŭ malpli grandaj kadroj de instruistoj necesaj por instrui la lingvon en la lernejoj;

konsiderante sepe, ke en la landoj, kie la nombro de instruistoj ne sufiĉas, oni aplikas sukcese lasttempe la rektan metodon de pastro Cseh, laŭ kiu instruas la lingvon fremdaj instruistoj;

konsiderante oke, ke en multaj lernejoj la lingvo estas instruata ne nur fakultative, sed devige, kaj ke eĉ la plej malriĉa intano povas lerni ĝin;

konsiderante naŭ, ke multaj ŝtatoj helpas kaj subvencias tiun instruadon, rekonante la grandan signifon, kiun Esperanto povas havi el la vidpunkto de la nacia intereso;

La Kongreso, sankciante la decidon de la Pariza Konferenco pri Esperanto-en la Moderna Vivo, kiu postulis la enkondukon de Esperanto en la lernejojn, decidis siaflanke sin turni al ĉiuj registaroj de la mondo kun la peto kaj alvoko, ke ili bonvolu aliĝi al la Interŝtata Esperanta Akordo pri la deviga enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj ke ĉiu ŝtato donu promeson enkonduki instruadon de Esperanto, se almenaŭ entute ses ŝtatoj donus la saman promeson enkonduki instruadon de Esperanto, natan de D-ro Czubrynski Interŝtatan Traktaton, kiel plej praktikan vojon por ĝeneraligi lernadon de Esperanto.

La Kongreso rajtigas sian Lokan Organizan Komitaton funkcii kiel la Realiga Komitato de la Kongreso kaj komisiis al ĝi informi la registarojn pri la laboroj kaj la rezolucioj de la Kongreso.

Kongreso.

TEXTBOOKS.

"Practical Grammar"-Dr Ivy Kellerman-Reed, member of World Language Committee. One of the most popular textbooks published-thousands in use.....75¢
"Step by Step in Esperanto-M.C. Butler, for self-instruction or class use...60¢
"Grammar and Commentary"-Gen. Cox, Filled with examples helpful to all..\$1.00¢
"Practical Course in Esperanto"-Dr Szilagyi-filled with amusing pictures to help. (adapted for English-speaking people by Fred Wadham-the last word)..50¢
"Esperanto Course"-Simon & Volper-its different but good for a starter...10¢
"Beginner's Easy Course"-Froding. The adjective tells the story.....10¢
"Esperanto Home Student"-Jas. Robbie. Latest edition-July 1937-Peerless for Self or class study. More than 50000 in use. The author is one of the best 20¢
MILLIDGE Esperanto-English Dictionary. Has no superior-not even a peer.\$2.75¢
FULCHER & LONG English-Esperanto Dictionary. Fit companion for Millidge \$2.40¢
"EDINBURGH" English-Esperanto & Esperanto-English. Size 4X6, 288 pages. This book is indispensable to young or old Esperantists. Do not wait.....\$1.00¢
"Kompleta Gramatika" kaj vortfarado de Esperanto". Name tells its story. \$1.70¢
"Plena Vortaro", all Esperanto. Essential to every advanced Esperantist. \$3.15¢

EASY and INTERESTING READING

Legolibro. Outlines of popular stories. 25¢. Sub la Meznokto Suno (Wendell)..25¢
Sep Ridoj. 7 laughable tales (Wendell)..25¢. Esperanto, its Aims & Claims....20¢
Akrobato de Nia Sinjorino (Payson)....25¢. Rakonto kaj Aventuro (Hall)....15¢
LANDO de ARGENTA AKVO. A tale of the West. Mopso de la Onklo (hold your hair) 15¢
Blanche, Virgulino de Lille (Payson)....20¢. Taso de Amservo (Taylor-Weems)..25¢
La Karto Mistera-tre intriganta.....25¢. Miserere, kaj Thais.....25¢
Juneco kaj Amo, (Payson) B'ds 25¢, paper. 15¢. Rozujo Ciuniljara (Wagnalls)....25¢
Kiel Placas al Vi, "As you Like it" by Dr. Radio Manuelo.....25¢
Ivy Kellerman Reed. Lea. Paper 35, Lea. 50¢. La Voje Returne (Remarque)...\$2.00¢
Per Balono al la Poluso (Andre)....\$3.00¢. La Regno de l'Vero (Koliner)....20¢
Surprises at Sylvia Farm (H W Fisher)..10¢. Piramo kaj Tizbeo (W G Adams)...10¢
Versajetoj, 40 pages of verse.....15¢. Princ' Vanco (Putman kaj Bates) 25¢
HAMANN'S ISPOGRAFIO LIBROJ: Fundamenta de Ispografio 55¢. La baza libro, de Ispo, aŭ Internacia Steno-Pazigrafio, kiu signifas internacia mallongskribo por ĉiuj kaj estas intencata farigi la dua skribo por ĉiuj, simili al Esperanto, la dua lingvo por ĉiuj. Key to English Ispography 10¢. Slosilo de Esperanta Ispografio 10¢. clave de Ispografia Espanola 10¢.
Guide to English Ispography (for acquiring speed) 60¢. Schlüssel der Deutschen Ispografie 10¢. Correspondence Course in Ispography-books included \$2.00

Holy Bible, Cloth \$1.75. Morocco, India paper-5 3/8 X 7 1/2-\$3.25.
New Testament, Cloth 75¢, Leather \$1.25, Persian Morocco \$1.75, Limp cloth...25¢

LA KONGRESA LIBRO-ORA JUBILEO de ESPERANTO-1937, is a souvenir the every ESPERANTIST should have-and having it you will be very proud of it. It is a MASTERPIECE of the printer's art, and the contents are worthy a place among the classics. Many are presenting this book to their City Libraries and to their Clubs--nothing will be more appreciated as a gift by the Esperantist friend. Burnished silver cover, with Green and Gold figures. Postpaid for 25¢. (This masterpiece was made by S-an@ Albert M. Koliner of Detroit, Mich.)

SUBSCRIPTIONS: "La Praktiko" (weekly) all Esperanto, Instructive, Amusing and informative. \$1.50 per year.
"Heroldo de Esperanto (Weekly), all Esperanto. Official organ of IEL year \$3.85
"Esperanto Internacia" (Monthly) " " " " " " \$1.50
"La Juna Vivo" (monthly). Not only good stories for young folks, but a good textbook as well. All Esperanto. 75¢. Whole year edition bound together 75¢.
British Esperantist, Est. 1903. English and Esperanto. Monthly. Per. year.....75¢

Advertising rates. Small advts 1¢ per word--minimum 25 words. 1 X3 1/2 inch 50¢-or 3 times for \$1.00. Full page \$4.00. Send copy before the 20th.
Photographs of Dr Zamenhof 8x10 50¢, Postcard 10¢. Postage stamp type 12 for 25¢

EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF EANA*AND BRING IN A NEW MEMBER * * *
Esperanto Association of North America, 1517 H St., N-W, Washington, D. C.
